3/2002
Aprilo/Majo
Bulteno de Hamburga Esperanto Societo r. a.

Olivarbeto plantita kun nomo "Hamburg"

Ekde la 17-a de marto, en ĝardeno en Istrio kreskas olivarbeto nomata "Hamburg". Ĝin plantis Hamburganino Elfi Sudec, nun vivante en Porec/Istrio, Esperantistino. Plion pri tiu okazaĵo Vi povas ekscii ĉ e retpaĝo "olivarboj" en esperanto ĉe: www.kastelir.hr-free.com

Sentenco	Editoraĵoj
Plej gravas en la vivo bona lito kaj bona paro da ŝuoj: Kiam oni ne estas en tiu, oni estas en la alia. el Norvegio	Redaktofino de n-ro 3/02: 15-05-2002

	Eldonanto: *Hamburga Esperanto-Societo r. a.* Klaus-Groth-Str. 95, D-20535 Hamburg Tel/Faks: +49 40 250 30 65 Prezidantino: *Dr. Vesna Stanicic-Burchards* Redaktoro: *Benno Klehr* Retpoŝto: Hamburg@Esperanto.de
La HES klubejo estas malfermita Jhaŭde ek de 18:30 h. Programo: 20:00 h.	Das Haus des Esperanto Vereins Hamburg ist geöffnet donnerstags ab 18:30 Uhr. Programm: 20:00 Uhr

Karaj legantoj,

pardonu ke vi ne ĝustatempe ricevis tiun ĉi numeron de Esperanto Hamburg, sed mi devis vojaĝi al suda Germanio pro la entombigo de mia 92-jara onklino.

Benno Klehr

Belega festo

okazis ĵaŭdon antaŭ pasko en la klubejo: La "Ovo-Kunveno" kun malvarma bufedo kaj multaj pentritaj ovoj.
Ni dankas al Elsbeth Wielgus, kiu sperte aranĝis la feston por pli ol 20 vizitantoj.

Nia programo

Aprilo 2002	Majo 2002
4 *Klubaj Aferoj:* ***UK 2003 en Gotenburgo -*** ***Ĉu Antaŭkongreso en Hamburg?***	**2** *Jürgen Wulff:* Informvespero
11 18.00 h *estrarkunsido* 20.00 h Prelego: Gastoj el Armenio prezentas sian landon	**9** *Ĉe Ellen-Ir-Tago* Kafo kaj kuko en la klubejo Komenco: 16.00 h
18 *Frank Merla:* Parolturnoj Pliriĉigu viajn lingvajn sciojn	**16** *Hannelore Brunow* Video-enigmo
	23 *Partoprenintoj raportas:* Germana Esperanto-

25 *V. Stanicic-Burchards* kiom da lingvoj ni parolas en Eŭropo? *Komenco: 20.00 h*	Kongreso en Husum **28** *Gerald Roemer* Diapositivoj pri la insulo Föhr

Informo de la kasisto

Karaj membroj,
eble vi konstatis, ke mi donis al tiuj, kiuj ĝiris sian GEA-kotizon al HES, kvitancon (Spendenbescheinigung) por la jaro 2001 de 20% de la GEA-kotizo.
Mi opiniis, ke mi nur povas kvitanci tiun monsumon, kion HES uzas por siaj propraj laŭstatutaj celoj. Tian informon ankaŭ donis nia koncerna financoficejo.
Tiuj 20 % estas parto de via kotizo, kio restas ĉe HES ekzemple pro la laboro enkasigi la GEA-kotizojn (ja ne ĉiu membro pagas akurate...) kaj ĝiri la kolektitan monsumon al GEA. HES tiel do iom profitas, se vi pagas vian GEA - kotizon al ni, **kaj por vi estas pli simple ĝiri nur unufoje.**
Kun la estraro de GEA mi pripensos solvon por tiu administra problemo por la estonteco.
Por solvi la problemon rilate la kvitanco (Spendenbescheinigung) por 2001, mi petis al GEA kvitanci la mankantajn 80 % de via pagita GEA - kotizo.
Se vi havas ankoraŭ demandojn, turnu vin al mi (telefono 491 71 94).

Salutas Gerald Roemer, kasisto de HES

Gastoj el Armenio en la Klubejo

Pri la klubvespero la 11an de Aprilo, el gazetartikolo de Lars Sözüer:
"Viele sehen Armenien heute nur als einen Teil der ehemaligen Sowjetunion", sagt Elbakjan. "Die wenigsten wissen, dass unser Land eine mehr als zweitausendjährige Geschichte als Staat hat." Bereits im Jahre 90 vor Christus gründete K□□ Tigranes das erste armenische Gro ˛eich. Im dritten Jahrhundert nach Christus war Armenien eines der ersten Reiche, das unter K□□ Tiridates III. das Christentum als Staatsreligion annahm. Später wechselten sich die Herrscher munter ab: Araber, Byzanz, Mongolen, Osmanen. Im 19. Jahrhundert eroberte schlie ˜ich Russland immer grö ąre Teile des Landes. "Zu den gr□□n Tragödien geh□□ aber die Verfolgung der Armenier in der Trkei am Ende des 19. und zu Beginn des 20. Jahrhunderts", fügt Elbakjan nachdenklich hinzu. Bei diesem Genozid, das von der Türkei bis zum heutigen Tag weitgehend geleugnet wird, wurden Millionen von Armeniern ermordet.
Doch der 51-j龖igen Geographin geht es bei ihren Vorträgen nicht vorrangig um die Vermittlung historischer Daten. "Ich will vor allem zeigen, wie armenische Kultur im Alltag aussieht", sagt sie. Dazu wird sie von einer Gitarre begleitet singen, Tänze in traditioneller Tracht aufführen und Bilder aus Armenien zeigen.

Jarĉefkunveno de HES

Jen la rezultoj de la elektoj:
Prezidanto: Dr. Vesna Stanicic-Burchards
Vicprezidanto: Heike Hagen (Küchenkasse und Vereinshaus)
Kasisto: Gerald Roemer
Sekretario: Jan Christof Hienerwadel
Adjunkto: Lars Sözüer
Delegito de la junularo: Kerstin Baasch
Konsilantaro: Hella Lanka, Jürgen Wulff, Benno Klehr, Jutta Sültz, Johann Eitmann, Gerhard Hein, Hartmut Neitzke.
Revizoroj: Elsbeth Wielgus, Klaus Diekmann, Jürgen Wulff

Kafoklaĉo
31.05.-2.6.2002

La Hamburga Esperanto-Junularo invitas gejunulojn el tuta Eŭropo dum semajnfino al nia urbo.
La nomo "kafoklaĉo" indikas, ke ne temas pri sciencnivela laborado, sed pri bonhumora distrado, aŭ laŭplaĉe pri interŝanĝo de spertoj kaj opinioj.

Harema Festo

La 16an de Marto okazis kostumfesto kun Ventro-Dancado. Partoprenis pli ol 20 personoj, inter ili 6 infanoj, el 5 nacioj. La feston organizis Hannelore Brunow.

Re al Esperanto en Hamburg